

### Enskribo

pri la komitata kunveno okazinta la 7an de jan. 1964 en la klubejo en hotelo Slovan. Ĉeestas s-anoj Vondroušek, Friedrich, Adamcová, Lorková, Veverková, prof. Scheiber, dro Šikula, Ambrož, Ballay, Borkovec kaj Kořínek. Malfermite je la 19.25 h.

S. Vondroušek parolas pri la malkreskanta frekventado de la klubkunvenoj kaj invitas la komitatanojn proponi rimedojn kaj manierojn kiel privigli la klubvicon. Poste s. Vondroušek kompilas la novan kvarmonatan programon, kiu estas dum la komitata kunveno preskaŭ kompletigata. Oni parolas pri aranĝo de la tradicia kluba balo kaj oni rezignas kun ĉies aprobo aranĝi ĉi-jare la balon, ĉar minacas risko de malsukceso. S-ano dro Šikula proponas aranĝi libroekspozicion en la vitroj de la Universitata biblioteko kaj s-ano Vondroušek komisias lin prizorgi tiun aferon. Oni parolas ankaŭ pri publika varba letero al diversaj eminentuloj kaj dro Šikula informiĝos, resp. prizorgos la kompilon de tia letero. Laŭ propono de pluraj komitatanoj oni fiksas la komencon de la klubkunvenoj al 19a horo, ĉar laŭplende niaj kunvenoj komenciĝas kaj finiĝas tro malfrue por laboruloj frumatene leviĝantaj. S-ano Vondroušek konigas, ke komitataj kunvenoj okazos ĉiun unuan mardon en monato. Tiucele ricevos s-ano Kořínek multobligitajn invitkartojn por invitado. Finite je la 20.30 h.

Enskribis Jiří Kořínek

### Enskribo

pri la ĝenerala kunveno okazinta la 4an de feb. 1964 en la klubejo en hotelo Slovan. Ĉeestis 24 klubanoj kaj kiel gasto redaktorino Kalendová el ĵurnalo Rovnost. Post la malfermo fare de s-ano Vondroušek je la 20.20 horo skizis la prezidanto ĉeĥlingve la staton de nia movado. Poste li petis s-anon Kořínek prezenti la sekretarian raporton. Post la tralego oni voĉdone aprobas ĉiesvoĉe la raporton. Sekvas la raporto de la bibliotekisto s-ano Ballay, kiun anstataŭ pro malsano ne ĉeestanta bibliotekisto tralegas s. Vondroušek. S. Ballay sciigas, ke pro alta aĝo kaj malsano li ne povas vintre venadi en klubkunvenojn kaj helpas lin kaj anstataŭas ĉe la libropruntedonado s-anoj Kaplerová kaj Antoš. Somere s-ano Ballay kontrolas la bibliotekon, por ke la libroj estu en laŭnumera ordo, admonas la prunteprenintojn, ke ili post 6 monatoj redonu la librojn, vizitas la legantojn, kiuj je admonoj ne reagis en iliaj loĝejoj. Tiel ni ricevis librojn de s-ano Vetchý post 3 jaroj kaj de s-ano Doubek post 11 jaroj; plue mi rebindas kaj gluriparas difektitajn librojn. La libroŝranko estis translokita al nia daŭra loko en la 2-a etaĝo de la Malnova Urbodomo. Je la 1.1. 1964 ni havis 628 librojn, t.e. je 26 pli multe ol pasintjare, nekalkulante librojn, kiuj estas destinitaj por la ekspozicio. Dum la j. 1963 estis pruntitaj 85 libroj al 28 legantoj.

Post la bibliotekista raporto sekvas la raporto de la kasisto prezentita de s-ano Borkovec kaj post la raporto de revizoro s-ano Němec, ĉiuj tri raportoj estas voĉdone de la ceestantoj aprobitaj. Oni esprimas absolutan aprobon al la tuta komitato eloficiĝanta. Post 5-minuta paŭzo transprenas la kunvenestrandon por elekto de nova komitato, s-ano Kořínek. Li dankas al eloficiĝintaj prezidanto kaj komitato kaj prezentas la proponojn por la novaj prezidanto kaj komitato, kiuj estas elektitaj: s-ano J. Vondroušek prezidanto, komitatanoj: Marie Adamcová, Josef Ambrož, Tomáš Borkovec, Aleš Bednařík, Josef Friedrich, Dagmer Konecká, Jiří Kořínek, Marta Lorková, Věra Podhradská, Prof. Vilibald Scheiber, Dr. inĝ. Jaromír Šikula, Zorka Veverková, Růžena Tomková kaj Anna Svozilová. Bibliotekisto Josef Ballay, helpota de s-anoj Kaplerová kaj Antoš, revizoroj Miloslav Němec kaj Sáva Střelec.

En sekvintaj diversaj proponoj proponas s-ano Hošek, ke oni starigu grupeton kun tasko fondi en diversaj entreprenoj Esperantajn uzinajn rondetojn, simile kiel tio sukcesis en Závody Jana Švermy kaj Fruta en Modřice, kie gvidas kursojn s-ano Friedrich post bona prepara laboro de s-ano Vondroušek en uzina disaŭdigo kaj gazeto. Oni diskutas la

proponon kaj esence akceptas la ideon penetradi ekster nian klubon en diversajn mediojn kaj uzinojn. Oni ankaŭ provos ĉiel interesigi centojn da malnovaj esperantistoj, kiuj aŭ tute staras ekster la movado, aŭ restante klubmembroj ne venadas en kunvenojn aŭ ŝuldas kotizojn.

Finite je la 22a horo.

Enskribis Jiří Kořínek